

# **La Sago 124**

## **Amorce de chemin de fer**

*Etat du chantier le dimanche 24 février 2019 à 22:20*

***Il reste à donner le BAT... et à remplacer les photos en basse définition.***



Zone euro : 3,50 €  
Autres pays : 4,50 €

Organe de l'Union des travailleurs espérantistes de langue française

www.sat-amikaro.org



## Congrès National d'Espéranto

La langue équitable

« SAT-Amikaro »

**Montluçon 20-23 avril 2019**



LYCÉE  
ALBERT EINSTEIN

**Spectacles, conférences**

**Bienvenue !**

Informations auprès de [daniel.lachassagne@orange.fr](mailto:daniel.lachassagne@orange.fr)

*Legu ankaŭ  
en ĉi tiu numero*

P. 2

**La vorto de la  
kasistino**

P. 5

**Agadraporto 2018**

P. 6

**Muzika aktivado de  
Vinilkosmo  
kompromitita**

P. 7

**Esperanto klubo  
de Saint-Etienne**

P. 8

**Malsano, handikapo  
kaj socio**

P. 11

**La nesuspektitaj  
kapabloj de la arboj**

P. 13

**Memoraĵo pri vojaĝo  
al SAT-kongreso  
en Kragujevaco**

P. 14

**De la vortlesivado  
al la cerbolavado**

# La vorto de la kasistino

## Realvoko 2019 - Rappel 2019

Okaze de la nova jaro, ni rememoras la aliĝantojn de SAT-Amikaro, ke ili povos aliĝi individue aŭ pere de ilia loka grupo. Se ili aliĝas individue, la baza kotizo estas 35 eŭroj kun abono je La Sago.

Se ili aliĝas pere de sia loka grupo, la kotizo estas ĉiam de 35 eŭroj kun abono je La Sago, sed SAT-Amikaro redonas 25 % de la kotizaro al la loka grupo. Por tio, la loka grupo kolektas la diversajn kotizojn de siaj aliĝintoj dezirante aliĝi al SAT-Amikaro, sendas la liston de la nomoj kaj adresoj (por sendo de La Sago), kaj la tutan sumon de la kotizoj, minus 25 %.

Ni rememoras al vi ke La Sago estas via ĵurnalo kaj ni ĉiam atendas artikolojn, notinde pri viaj aktivajoj en via loka grupo, preferinde de Esperante. Ni antaŭdankas vin.

**Por la komitato,  
Solange**

*A l'occasion de la nouvelle année, nous rappelons aux adhérents de SAT-Amikaro qu'ils peuvent adhérer individuellement ou par l'intermédiaire de leur groupe local. S'ils adhèrent individuellement, la cotisation de base est de 35 euros avec abonnement à La Sago. S'ils adhèrent par l'intermédiaire de leur groupe local, l'adhésion est toujours de 35 euros avec abonnement à La Sago, mais SAT-Amikaro laisse 25 % de l'ensemble des cotisations au groupe local. Pour cela, le groupe local rassemble les diverses cotisations de ses membres désirant adhérer à SAT-Amikaro, envoie la liste des noms avec les adresses (pour envoi de La Sago), et le montant global des cotisations, déduction faite des 25 %.*

*Nous vous rappelons que La Sago est votre journal et que nous sommes toujours en attente des articles que vous pourriez nous envoyer; notamment sur les activités de votre groupe local, de préférence en espéranto. D'avance, nous vous en remercions.*



CPPAP n° 0322 G 86224. ISSN : 1763-1319. SAT-Amikaro, 132/134, boulevard Vincent-Auriol, 75013 Paris.

**Directeur de la publication :**

Pierre Lévy.

**Imprimé par :**

Parbleu!/Ravin Bleu 75017 Paris.

Dépôt légal à parution.

**Ĉefredaktanto :** Petro Levi.

**Enpaĝiganto :** Jean-Luc Ancey.

**Redakt- kaj kontrol-skipo :** Janine kaj Yannick Dumoulin, Luk' Gouverneur, Ĵak Le Puil, Petro Levi.

**Partoprenis en ĉi tiu numero :**

La Komitato, Brigitte Ardon, Elizabeth Barbay, Philippe Crassous, Pierre Dieumegard, Anino Griffon, Pierre Grollemund, Daniel Lachasagne, Isabelle Lamyrested, Lucette Lejeau, Jack Le Puil, Michel Marko, Vito Markov, Jocelyne Monneret, Tereza Sabatier, Bert Schumann, Solange Van Landeghem.

**Kontribuajoj**

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto :

sekretario@sat-amikaro.org kaj paralele al lucette.lumeto@laposte.net

• Prefere per reto, tekstoj en ODT-aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, bildoj en JPEG- aŭ PNG-formo.

• Artikoloj ricevitaj post la 20a de la paraj monatoj ne povas esperi aperigon en la tuj sekvonta numero.

Samajn retadresojn por ajnaj rimarkoj/kritikoj (sed ĝentilaj) *Mêmes adresses courriel pour toutes remarques*

### Contributions

*Toujours bienvenues ! À faire parvenir au correspondant de la rédaction.*

• *De préférence par Internet, textes en format ODT ou TXT pour un document joint, et images en format JPEG ou PNG.*

• *éventuellement sur papier par poste, les textes de préférence typographiés pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge).*



## Kio estas SAT ?

Sennacieca Asocio Tutmonda : naskiĝis en 1921, estas asocio tutmonda de laboristoj, kaj pli ĝenerale de progresemluloj, kies agado centriĝas sur kulturo kaj popola edukado. Ĝi utiligas Esperanton kiel laborlingvon.

[www.satesperanto.org](http://www.satesperanto.org)

Aliĝo kun abono al « Sennaciulo » 52 € (Nura abono : 57 €)

• En Francio : Barthélémy Maurau : 3, allée Nathalie-Sarraute, 27000 Evreux p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

IBAN : FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070; BIC : PSSTFRPPPAR

• En Belgio : Claude Glady ; Rue du Colot, 1 ; B-5630 Cerfontaine ; Bankkonto N° 750-6373051-18

• *Les articles reçus après le 20 des mois pairs ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro immédiatement suivant.*

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto.**

**Ce numéro est accompagné d'un supplément « referendumilo ».**

| Tarifoj<br>Tarifs  | Be, CH<br>Fr    | Aliaj<br>landoj |
|--|-----------------|-----------------|
| Kotizo (kun abono 60 %)<br>Cotisation (avec abonnement)  | 35,00 €         | 42,00 €         |
| Kotizo sen abono<br>Cotisation sans abonnement   | 14,00 €         | 14,00 €         |
| Subtenkotizo (abono 30 %)<br>Cotis. soutien (abon. 30 %)   | 70,00 €         | 84,00 €         |
| Junulo (malpli ol 25 j.),<br>senlaborulo, kunul(in)o<br>Jeune (moins de 25 ans),<br>chômeur, conjoint(e) | 17,50 €         | 21,00 €         |
| Minimuma kotizo<br>Cotisation minimale   | libera<br>libre | libera<br>libre |
| Simpla abono<br>Abonnement simple  | 32,00 €         | 39,00 €         |





# 71a Kongreso de SAT-Amikaro

*Nia jara kunveno okazos en Montolucono  
ekde la 20a ĝis la 23a de aprilo.*

## PROGRAMO

| SABATON la 20an   | DIMANĈON la 21an  | LUNDON la 22an  |
|---|---|---|
| <b>Matene</b>   |   |   |
| <p><i>Bonvenon</i></p>  <p><i>Honorvinon</i></p> |  <p>Ĝenerala Asembleo</p> <p>Informo de Flo Martorel pri sia prelego<br/><i>Foto</i></p> |  <p>Ĝenerala Asembleo</p> <p>Prezento :  SAT-kongreso</p> |

|   |   |  |
|---|---|--|
| <b>Posttagmeze</b>  |   |  |
|  <p>Le musée qui s'écoute</p> <p>Vizito : <b>Muzika muzeo</b><br/>« MUPOP »</p> <p>Prelego : Thierry SALADIN<br/>« TUJ »</p> <p>« Voûte nubienne »<br/>Pierre Grollemund</p> | <p>Ĝenerala Asembleo<br/>Sekvo (ĝis 15h30)</p>  <p>Vizito Prelego</p> <p>Mezepoka civito Muziko<br/>kaj Flo Martorel<br/>burbona kastelo</p> | <p>« SKAJPE » kun aliaj,<br/>kiuj ne povas ĉeesti<br/>(ekz. Afrikanoj)</p> <p>Prelego Alice/Cédric<br/>« Kuŝbicikle tra la mondo »</p> |

*LIBRO-SERVO : ĉiun finon de posttagmezo*

|   |   |  |
|---|---|--|
| <b>Vespere</b>                                    |   |  |
| <p>Koncerto « VOJAĜO »</p> <p>« Planedo Nia »</p> | <p>Koncerto « AXSES »<br/>loka dueto</p> <p>« Grain de ciel »</p> | <p>Koncerto<br/>Ĵak Le PUIL /Serge SIRE</p> <p>« Sen Eliz' »</p> |

**MARDON**  
la 23an

Gvidata vizito de la Lernejo Muzeo  
« La Granda Meaulnes »  
20 km for de Montolucono, per kunveturado





## Dum la kongreso, vizitoj kaj ekskursoj en Montluçon kaj proksime

- Musée des Musiques Populaires (Mupop), « le musée qui se regarde aussi avec les oreilles ! » (visite guidée de deux heures, sur réservation) et Jardin Président-Wilson.

- Château des ducs de Bourbon (d'où le nom de la province, le Bourbonnais, et des habitants de l'Allier, les Bourbonnais) et cité médiévale (visite guidée).

- Château de la Louvière, le « Petit Trianon » de Montluçon, musée historique et parc à la française.

- Centre Aqualudique de la Loue à Saint-Victor, à 5 km de Montluçon (pour les amateurs de grand bain).

- Pont-Canal de Chantemerle sur le Canal de Berry (*photos ci-dessus*) à Vaux, à 10 km de Montluçon, magnifique ouvrage d'art rénové en 2018.

- Musée du Canal de Berry à Aude-Magnette, à 15 km de Montluçon, musée de l'épopée des éclusiers et des bateliers.

- Espace Naturel Sensible de la Vauvre à Nassigny (réserve ornithologique de 46 hectares, deux heures

de marche), à 20 km de Montluçon.

- Musée-Ecole du « Grand-Meaulnes » (Alain-Fournier) à Epineuil-le-Fleuriel (Cher), à 25 km de Montluçon (visite prévue le mardi 23 avril 2019).

- Forêt de Tronçais, chênaie de 10 000 hectares, classée « forêt d'exception » (chênes sessiles) en 2018, à 40 km de Montluçon.

- Centre national des costumes de scène à Moulins, à 70 km de Montluçon ; exposition « Les costumes font leur show ! » jusqu'au 28 avril 2019.



La partoprenantoj de la 71a Kongreso de SAT-Amikaro povos aŭdi « Planedo Nia », t.e. koncerton de Vojágo je sabato la 20a de aprilo, vespere.

*Daniel Lachassagne avec son équipe. Ils réalisent dans la convivialité une belle préparation de congrès.*



## Unuaj partoprenantoj

Eliane Apcher (63)  
Monique Arnaud (05)  
Daniel Avouac (03)  
Céline Bernard (81)  
Francis Bernard (48)  
Monique Bernard (48)  
Jacqueline Brunetti (63)  
Simone Cajelot (88)

Laurence Canham (03)  
Lucette Échappé (44)  
Michelle Erhart (67)  
Lauriane Gaillard (03)  
Maksimilien Guerin (75)  
Françoise Guihaume (72)  
Félix Hartmann (63)  
Bruno Henry (Changsha Hunan, Ĉinio)  
Isabelle Jacob (87)  
Sandrine Jouvie (87)  
Daniel Lachassagne (03)

Armela Le Puil (18)  
Jack Le Puil (18)  
Jacqueline Lepeix (63)  
Michèle Longue Epée (18)  
Katia Lopez Ruiz (03)  
Lucien Magnaud (63)  
Guy Martin (17)  
Frank Mintz (72)  
Jocelyne Monneret (71)  
Dominique Poirel (03)  
Gérard Tantot (03)  
Solange Van Landeghem (18)

# Agadraporto - *Rapport d'activité* 2018

- SAT-Amikaro financis la registradon de la kanzono Esperanto ou tard de Morice Benin.
- Eric daŭrigis la sendadon de libroj kaj vortaroj en Afriko (Congo RDC) ; li sendis 449 librojn el kiuj 195 poŝvortarojn, kelkajn infanlibrojn. Kompleta dokumento, preparita de Eric estos enpaĝigita en specialan La Sago 125, kiu traktos « rilatojn kun niaj afrikaj amikoj ».
- Véronique Girard daŭrigis sian altaprezan helpon en libroservo.
- Ni iomete partoprenis en la Homara Festo por prezenti Esperanton.
- Ni dungis Isabelle Nicolas por ĉiuj merkredaj posttagmezoj (kelkfoje marde laŭ ŝia prefero)
  - por pli longtempe malfermi la librovendejon, ktp.,
  - Isabelle jam vendis kelkajn librojn, ekzemple kvar PIV-ojn la saman tagon,
  - ŝi akceptis kelkajn vizitantojn,
  - ŝi iniciatis – pere de komercaj metodoj – kelkajn kontaktojn kun Sociaj Kulturaj Centroj, ekzemple kun tiu de Centro Daviel en la 13a distrikto,
  - danke al tiuj klopodoj okazis interalie posttagmeza prezentado en tiu kulturcentro Daviel farita de kvar parizanoj. Kaj plia prezentado estas planita, kiu okazos antaŭ la fino de la lernoĵaro.
- Tereza Sabatier starigis konkurson de infanaj desegnaĵoj, kadre de la Pariza SAT-Amikara kongreso ; tiu konkurso konis sufiĉe da sukceso ; poste Isabelle-Paule Lamyrested elmontris ĝin en nia montrofenestro. Kaj Isabelle N. publikigis tiujn desegnaĵojn sur la retejo de 13a distrikto de Parizo.
- Aperis 5 numeroj de « La Sago », la 121a, 122a kaj 123a kun la aktiva partopreno de Jean-Luc Ancey, kiu realigis la enpaĝigon, kaj de pluraj novaj kontribuantoj, el kiuj kelkaj ankoraŭ ne estas esperantistoj. Ni (la komitato) ricevis plurajn pozitivajn reagojn, sed pluraj insistas por ke ni lasu kelkajn dulingvajn partojn. Tio ĉi precipe dependas de la kontribuantoj.
- Ni eldonis, kune kun la loka asocio ILO, en kiu kontribuas loka grupo de SAT-Amikaro, la porinfanan libron La revmedikamenta trinkaĵo. La libro jam aperis kaj ĉiuj antaŭaĉetantoj ricevis siajn librojn. Nun la libro estas aĉetebla kaj kostas 12 € en ĉiuj librovendejoj kiuj aĉetos ĝin de ILO por 10,20 € (ĝi estas registrita ĉe Dilicom).
- Ni iom multoblis la kontaktojn kun lokaj grupoj.
- Okaze de kunveno, ni aŭskultis kaj konsentis pri la proponoj de Maximilien Guérin, por renovigi nian retejon por pli bona komunikado kaj videbleco.
- Ni reprezentis SAT-Amikaron en la SAT Kongreso en Serbio.
- Libroservo kaj aliaj librovendejaj aferoj :
  - Lucien Bresler zorgas ĉiujn vendredojn pri la enpakigo kaj la poŝta sendo de la libroj ; lin dumvintre helpas Régis Fournier.
  - Régis ordigas kaj reordigas la skatolojn da libroj ; sendis informraportojn ; en decembro li inventaris la librojn en la skatolojn pere de sonregistrilo.
  - aliaj parizanoj deĵoras en la butikoj : Elizabeth instruas la lingvon, Isabelle-Paule, Lucien zorgas pri diversaj taskoj.
  - G. Cavalier zorgis pri vendoj en eksteraj budoj kaj pri la rilatoj kun la SAT-ejo.
  - G. Martin, Véronique kaj Solange finaranĝis la kontojn de 2017.
- SAT-Amikaro a financé l'enregistrement de la chanson « Esperanto ou tard » de Morice Benin.
- Eric Eliard a continué d'envoyer livres et dictionnaires en Afrique (Congo RDC) ; il a envoyé 449 livres dont 195 dictionnaires de poche, 77 cours rationnels, quelques livres pour enfants. Le document complet préparé par Eric sera inséré dans le numéro 125 « spécial relations avec nos amis africains ».
- Véronique Girard a continué d'apporter son aide précieuse, pour le libroservo.
- Nous avons un peu participé à la présentation de l'espéranto lors de la fête de l'Humanité.
- Nous avons recruté Isabelle Nicolas pour les mercredis à midi (parfois elle a préféré les mardis)
  - afin d'ouvrir un peu plus la librairie, etc.,
  - Isabelle a effectué quelques ventes de livres et dictionnaires, dont quatre PIV le même jour,
  - a reçu quelques visites,
  - a initié – par démarches de type commercial – quelques contacts avec des centres sociaux culturels comme celui de Daviel, dans le 13e arrondissement,
  - de ces démarches il a résulté notamment un après-midi d'animation dans ce centre culturel Daviel par 4 « parizanoj ». Et une animation a été programmée avant la fin d'année scolaire.
- Tereza Sabatier a mis en place le concours de dessins d'enfants, dans le cadre du congrès à Paris ; ce concours a connu un certain succès ; puis Isabelle-Paule Lamyrested a exposé les résultats dans la vitrine. Et Isabelle Nicolas a fait publier les dessins réalisés sur le site du 13e arrondissement parisien.
- Nous avons réalisé cinq numéros de La Sago, dont les numéros 121, 122 et 123 avec la participation très active de Jean-Luc Ancey qui a réalisé la mise en page, et de plusieurs nouveaux contributeurs/trices, dont quelques-uns non encore espérantistes.
- Plusieurs personnes insistent pour que nous laissions une petite partie en bilingue, ce qui dépend principalement des contributeurs.
- Nous avons édité en commun avec l'association locale ILO, au sein de laquelle contribue un groupe de SAT-Amikaro, le livre pour enfants La revmedikamenta trinkaĵo. Ce livre peut maintenant être acheté dans toutes les librairies au prix de 12 €. Il est enregistré chez Dilicom.
- Nous avons un peu augmenté nos contacts avec les groupes locaux.
- Au cours de l'une de nos réunions, nous avons écouté et accepté les propositions de Maximilien Guérin, afin de rénover le site de SAT-Amikaro pour une meilleure communication et une meilleure visibilité.
- Maximilien anime aussi la page Facebook et modère la liste de discussion.
- Plusieurs d'entre nous ont représenté SAT-Amikaro au congrès de SAT en Serbie.
- Libroservo et autres dans la librairie :
  - Lucien Bresler, les vendredis, réalise les paquets et les poste ; il est aidé l'hiver par Régis Fournier.
  - Régis range et met en ordre les caisses de livres ; il envoie des rapports ; en décembre, il a fait le bilan des livres dans les caisses au moyen d'un enregistreur.
  - d'autres « parizanoj » s'activent : Elizabeth enseigne, Isabelle-Paule, Lucien réalisent diverses tâches...
  - G. Cavalier s'est occupé des ventes à l'extérieur et aussi des relations avec le siège de SAT.
  - G. Martin, Véronique et Solange avaient finalisé les comptes 2017.



# Grava alarmo ! Muzika aktivado de Vinilkosmo kompromitita !

<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/102-grava-alarmo.html>

Tre bedaŭrinde ni konstatis gravan malkreskon de la intereso al Esperanto-muziko en la jaro 2018 kun gravaj konsekvencoj... tio estas ege malmultaj diskovendoj, sed ankaŭ ege malmultaj elŝutvendoj... Paralele pli kreskis la elsendflua aŭskultado, sed tre bedaŭrinde, ĝi ne sufiĉe pagas por vivtenigi la eldonejon kaj baras tutan eblan perspektivon...

Pro tio estis kreita la Abonklubo, kiun ni vidis kiel alternativon helpe de la justa elsendfluejo (Divercities Music) por pludaŭrigi la muzikproduktadon kaj eldonadon.

Sed tre bedaŭrinde post tri jaroj da ekzisto, ni devas konstati ke ankaŭ la Abonklubo malsukcesas...

Videble, homoj preferas daŭre aŭskulti muzikon senpage en aliaj retejoj (kiel Deezer, Youtube aŭ Spotify)...

Vinilkosmo provos ankoraŭ elteni unu plian jaron, sed se en 2019 ne inversiĝos la situacio kaj ne multobligos abonantaro de la Abonklubo kaj la uzantaro de Divercities Music,



Vinilkosmo devos fermi.

Konsekvencoj de la fermo de Vinilkosmo estos jenaj :

- Tuja malapero de la katalogo de Vinilkosmo en la reto (propra muzika platformo, sed ankaŭ en Divercities Music kaj en ĉiuj aliaj muzikaj platformoj, kie nun estas disponebla la katalogo de la eldonejo).

Tio signifas ke en Deezer, Spotify, ktp, vi ne plu povos aŭskulti muzikon de la Vinilkosmo-katalogo.

- Malaperos la ebleco de regula muzikproduktado, eldonado de novaj albumoj de artistoj, aŭ reeldonoj de malnovaj albumoj.

Kiel eviti fermon de Vinilkosmo ?

Esperantistoj devas konscii, ke ne eblas uzi kaj aŭskulti Esperanto-muzikon sen subteni ĝin pli aktive kontribuante por ke ĝi pluvivu. Do konklude kaj praktike, la nura alternativo por eviti fermon de Vinilkosmo estas ke ĉiuj homoj, kiuj volas daŭre povi aŭskulti Esperanto-muzikon (el la katalogo de Vinilkosmo) aliĝu al la Abonklubo (eĉ se ili ne uzas la justan elsendfluejon Divercities Music) kun la celo multobligi la nombron de abonantoj.

Sen tio, en 2020 tute malaperos la muzik-katalogo de Vinilkosmo el la interreta pejzaĝo.

Dankon pro via atento kaj via subteno !

**La tuta teamo de Vinilkosmo**

## Nova albumo de Morice Benin

Dek sep jarojn post la apero de la albumo In-spir', Morice Benin denove surprizas nin per esperanto.

Estas ĉi tie, kun la kunlaboro de SAT-Amikaro (kiu financis la registradon) kaj sendependaj eldonejoj Fanal kaj Vinilkosmo, ke ĉi tiu unukantaĵo en la franca pri esperanto, kaj ĝia instrumenta versio por karaokeo, estas naskita.

Sed la artisto prezentu sian propran verkon :

« Esperanto ? Ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas ?


» Antaŭ pli ol jarcento, sonĝo naskiĝis : pontlingvo por multaj milionoj da malsamaj homoj kaj solidareco en la mondo : malplimultoj sed fierege fraternaj. Ĉi tiu lingvo utilis al neniu naciismo, neniu skismo, neniu komerco, neniu ideologia servuteco, en resumo, neniu politike ĝusta celo. Hodiaŭ, ĝi ankoraŭ fosas sian neprobablan sulkon en mondo fariĝinta malamika, konkurencema, kie la angla lingvo regas kiel absoluta mastro.

Komence, kio altiris min al ĉi tiu utopio estas la komuna penado, kiu postulas ĝian lernadon : komenca demokrateco, kie neniu potenco estas en ludo. Estas nur afero aliĝi al certa planeda civitaneco transdonita en resonon kun ĉi tiu fekunda frazo de André Gide : « La mondo estos savita nur de la ribelemaj homoj. Ĉi tiuj nesubmetitoj estas la salo de la tero. »

» Antaŭ dek kvin jaroj, mi komencis kanti en ĝi, kvankam mi ne vere praktikas ĝin, nur provante aldoni mian malgrandan ŝtonon al la konstruaĵo de ĉi tiu obstina kaj fondanta sonĝo. »



## Premio por faka aŭ traduka laboro en lingvo Esperanto



La Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (OSIEK), dum sia 30a IEK, okazinta en Greziljono je julio 2018, atribuis la OSIEK Premion 2018 al Frédéric Lauriol por lia faka laboro en lingvo Esperanto, kiel aŭtoro de la Teknika Vortaro de Greziljono.

OSIEK estas internacia societo, kiu celas la organizadon de kulture kiel eble plej altnivelaj, liberaj kaj sencenzuraj Internaciaj Esperanto-Konferencoj (IEK). Diskutado kaj interŝanĝoj, ekzemple post lekcionoj kaj kursoj, samkiel turismaj aranĝoj, celantaj interkonadon kaj estimon internetajn, kontribuas al disvolviĝo de vere internacia kulturo.

Enkadre de OSIEK, diversaj laborgrupoj prizorgas apartajn kulturajn agadojn, interalie « Premio por faka aŭ traduka laboro en lingvo Esperanto ».

OSIEK ĉiujare atribuas premion al vivanta esperantisto pro kultura kreaĵo precipe nefikcia en Esperanto, publikita per ia ajn perilo (libro, kasedo, bendo, mikrofilmo, kompaktdisko...), kies amplekso egalvaloras al 100-paĝa libro. Kaze de traduko, la premio rekompensas la esperantigon, sendepende de la naturo de la originalo.

La nuna valoro de la premio estas 700 eŭroj (ekde 2009).

(<http://osiek.org>)

Eblas aĉeti la vortaron ĉe la libroservo de Sat-Amikaro : Teknika vortaro de Greziljono, Français-Espéranto Espéranto-Français ; eldonis SAT-Amikaro (2016) ; 18,00 €, 370 gr.

# Esperanto klubo de Saint-Etienne

Nia asocio regule kunvenas kaj provas konatigi al la plej larĝa publiko la ekziston kaj kapablojn de la Internacia Lingvo.

Praktike de Esperanto okazis jam de la jaro 1940 kaj daŭris, malgraŭ malpermeso dum la dua mondmilito.

## Niaj klopodoj por eksteraj inform-agadoj

Ni frontas en nia urbo la samajn malfacilaĵojn, kiel en aliaj regionoj: multaj personoj ne konas la vorton Esperanto aŭ scias ege malmulte pri ĝi. Precipe ĉe junuloj. Plie, la nuna ideo, ke la angla utilas kiel internacia komunikilo estas vaste dissemata. Ne temas nur pri ideologio (la fama « ununura pensmaniero » [*pensée unique*] sed realeco ofte spertita, eĉ se la parola angla aspektas nur kiel malalt-nivela *gobish* !

Estas do vere necese iri ekster niaj asocioj al kiel eble plej larĝa publiko ! Tamen, niaj rimedoj havas limon, kaj la rezultoj ne ĉiam respondas al niaj esperoj. Kio estis farita en la pasinta jaro 2018 ?

- Ni disdonis la kalendarojn eldonitajn de JEFO.
- Ankaŭ la kartetojn kiuj reklamas pri i-kurso.
- Ni partoprenis kiel en la pasintaj 7 jaroj en la Festival *Curieux Voya-*

*geurs* : temas pri prezentado de multaj vojaĝ-filmoj kaj prelegoj. Ĉeestas en la ĉambroj diversaj asocioj, ĉu vojaĝemaj, ĉu solidaremaj. En 2018, ni venigis iun esperantiston, Alain Rémy, fama biciklisto, kiu sur sia kuŝbiciklo jam veturis pli ol 100 000 km. Li prelegis per siaj fotoj kun granda vigleco kaj humuro ! Poste en julio li biciklis ĝis Lisbono okaze de la Monda Kongreso.

• Okaze de la nacia tago de poezio, ni povis prezenti Esperanton en la biblioteko de la apuda urbeto Monistrol-sur-Loire per ekspozicio de poemoj, tradukitaj aŭ originalaj. Prelegito kun inicialaj ekzercoj kaj kanto « karaoke » ebligis doni ĝustan bildon de la lingvo.

• ESPE : La supera lernejo por ontaj instruistoj (precipe ĉe baz-lernejoj) nomiĝis antaŭe « *Ecole normale* », poste « *IUFM* » kaj nun ESPE « *Ecole Supérieure de Professorat et d'Education* ». Post longaj ĝentilaj kontaktoj, ni fine estis invitataj prezenti antaŭ studentoj la propedeŭtikajn



Alain Rémy.

valorojn de Esperanto. La studentoj estis finontaj sian lastan jaron [*Master 2*]. En la tri sinsekvaj grupoj en majo kelkaj malkovris kun intereso nian lingvon. Ĉu ili uzos ĝin poste en sia profesia praktiko, tio ne estas nun konata !

• Ni disdonis inform-foliojn pri Esperanto antaŭ la enirejo de studenta biblioteko (estas 10 000 studentoj en nia urbo !) kaj en kelkajn leterkes-tojn de studentaj gastejoj.

• En novembro okazas ĉiujare la Salono *Tatou Juste* (ekologiisma). Multaj kontaktoj, el kiuj ni atendas almenaŭ unu aŭ du pliajn reagojn.

Notu nian novan plaston afiŝon « *Espéranto, un lien entre les peuples ; un pont entre les cultures* ».

Ni profitis la okazon por prezenti (en la franca) lumbildan « *Power Point* » pri konstruado de domoj kun volboj en okcidenta Afriko. Tia konstru-metodo prezentas multajn avantaĝojn. La esperanta artikolo aperis en la revuo *Konstruado* 2018. Restas kelkaj ekzempleroj, mendeblaj al la Klubo de Saint-Etienne ĉe [verdapigo@yahoo.fr](mailto:verdapigo@yahoo.fr).

• Multaj personoj bonvolas interesiĝi pri Esperanto, sed ne volas dediĉi tempon al ties lernado. Ni konservis 50-on da ret-adresoj al kiuj ni sendas (kvar foje jare) etan « *Bulletin d'information stéphanois sur l'espéranto* ». Ili ricevas, eble legas (?) sed nur kelkaj respondas, kiel oftege ĉe Internet.

• Fine de junio, ni iris triope al CHOK-Théâtre por partopreni liber-espriman vesperon. Ni prezentis « *Le corbeau et le renard* » en Esperanto. Knabeto imitis la movojn de la korvo, kio multe ridigis la spektantojn, kiuj evidente estis rekonintaj la fablon ! Ni poste disdonis folion kun la teksto en Esperanto « La korvo kaj la vulpo » (ankaŭ disponebla por la legantoj de *La Sago* ! (sama ret-adreso).



## Programo 2019 de la Kulturdomo de Esperanto-Kastelo Greziljono

Adreso : Château de Grésillon, F-49150 Baugé-en-Anjou

Kontakto : [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), (33) 2 41 89 10 34

Ĥora-korusa kantado aŭ NaturArto : 12-16 aprilo

Intensivaj kursoj kaj KER-ekzamenoj aŭ piedmigrado : 26 aprilo-4 majo

Maratona E-kurso kaj interŝanĝoj de scioj : 8-18 julio

Festa Semajno por infanoj-familioj kaj popoldancoj : 6-16 aŭgusto

Aŭtuna staĝo : 26 oktobro-3 novembro

Vidu la agendon rete en : <http://gresillon.org/agendo>

Chant chorale ou LandArt : 12-16 avril

Cours intensifs et examens ou randonnée : 26 avril-4 mai

Cours marathon et échanges de savoirs : 8-18 juillet

Semaine enfants-familles et danses traditionnelles : 6-16 août

Stage d'automne : 26 octobre-3 novembre

Voir l'agenda en ligne : <http://gresillon.org/agenda>



# Malsano, handikapo kaj socio

## Maladie, handicap et vie sociale

Esti malsana estas malbone farti. Kutime, malsano estas nedaŭra stato : la fino estas resaniĝo, aŭ morto. La kuracisto devas plifaciligi la unuan finon, laŭeble.

Handikapo iel similas malsanon, kaj foje kuracistoj povas grave agi, sed tio ne estas ĉiam. Handikapo ĉefe estas socia problemo : handikapulo ne povas kondukti same kiel averaĝa homo.

Ni vivas en socio, kie gravas esti laŭ normoj. Industriaj objektoj kongruas kun la averaĝaj dimensioj de niaj samteranoj : dimensioj de ĉambroj en loĝejoj, dimensioj de seĝoj en aŭtomobiloj, ktp. Tiuj, kiuj estas ekster normoj, ĉar ili estas tro grandaj aŭ tro malgrandaj, tro dikaj aŭ tro maldikaj, ne estas komfortaj. Kaj tiuj, kiuj havas normalajn dimensiojn, sed manojn aŭ piedojn, kiujn ili ne povas normale uzi, estas ankoraŭ pli malkomfortaj.

Antaŭe, tiuj, kiuj havis malpli da fizikaj povoj ol normalaj homoj rapide mortis : nepovante manĝi, aŭ batali kontraŭ homoj aŭ bestoj, aŭ vidi danĝeron. En nia nuna socio, feliĉe, kolektiva agado ebligas (pli) longan vivon al handikapuloj.

Dum praaj tempoj, mi estus mortinta jam plurfoje. Unue, pro mia tre forta miopeco : ne povante vidi malproksime estus tre malfavore. Due, mi estas paralizulo pro paraplegio : ne kapabli paŝi, ofte vundiĝi en postaĵo, havi mikrobojn en renoj kondamnus min al rapida morto. Nuntempe, per du teknologiaj iloj, okulvitroj sur miaj okuloj kaj rulseĝo sub mia postaĵo, ne nur mi estas vivanta, sed ankaŭ mi povas partopreni kvazaŭ normale en socia vivo.

Tamen, en la socio, la du malfaciloj kaj la du iloj ne similas. Esti miopa kaj uzi okulvitrojn ne estas taksite kiel esti handikapa ; male, esti paraplegia kaj sidi sur rulseĝo, jes, estas handikapo, ĉar ĝi estas pli videbla, kaj sociale pli grava.

La socio en kiu ni vivas agnoskas iujn handikapojn, ekzemple bezoni rulseĝon por iri, aŭ bezoni bastonon por esplori sian medion pro manko da vido. Pro tio rulseĝo estas simbolo de handikapo, kaj ĝia bildo montras la alir-eblecon por handikapulo, ekzemple por parkumaj lokoj, kaj blanka bastono estas simbolo de uzeblo por nevidantoj.

Sed tio estas nur parteto de la problemo, ĉar multaj homoj estas handikapitaj, eĉ se ili ne havas rulseĝon aŭ blankan bastonon : malbona vido, malbona memoro, malfacilo por paŝi eĉ nur foje, malfacilo por preni objektojn per mano, ktp.

« Normoj » de alireblo havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Kiam ili estas bone aplikitaj, ili faciligas la vivon de koncernataj homoj, sed kiam ili estas fuŝe aplikitaj, ili nur estas kromaj elspezoj, neutilaj.

Antaŭ dudek kvin jaroj, mi instruis en urbo Marseille, kaj la liceo estis renovigata de la Regiona Konsilantaro, per grandega elspezo de publika mono. Tio estis tre utila, ĉar dum kvindek jaroj, kvazaŭ ne estis porkonservaj laboroj. Jam en 1992, estis leĝo kiu ordonis ke ĉiuj konstruaĵoj, kiuj ricevas publikon, estu alireblaj per rulseĝoj.

En klasĉambroj, antaŭ tiuj laboroj, estis ligna granda podio, malfacile uzebla per rulseĝo. La instruistoj kaj teknikistoj petis por la novaj klasĉambroj nur etaj podioj. Dum la laboroj, ni ekkonis ke grandaj betonaj podioj estis konstruataj. Ni plendis, kaj finfine la responsuloj konsentis ke du klasĉambroj estu kun malalta podio. Tamen, mi plendis je la ofico de Regiona Konsilantaro, por scii kial konstrui tiajn grandajn podiojn en konstruaĵo oficiale

*Être malade, c'est ne pas être en bonne santé. Normalement, la maladie est un état transitoire, soit on en guérit, soit on en meurt. Le rôle du médecin est de favoriser le premier terme de l'alternative.*

*Un handicap a certains aspects de la maladie, et parfois les médecins peuvent avoir un rôle important, mais ce n'est pas obligatoire. Un handicap c'est surtout un problème social : la personne handicapée ne peut pas se comporter comme la moyenne des gens.*

*Nous vivons dans une société où être dans la norme est important. Les objets fabriqués en grande quantité sont adaptés à la taille moyenne de nos concitoyens : la taille des pièces dans les logements, la taille des sièges des voitures, etc. Ceux qui ne sont pas dans la norme, parce qu'ils sont trop petits ou trop grands, ou trop maigres ou trop gros, ne sont pas à l'aise. Et ceux qui ont une corpulence normale, mais des mains ou des pieds qu'ils ne peuvent pas utiliser normalement sont encore moins à l'aise.*

*Autrefois, ceux qui avaient des capacités physiques inférieures à la normale mouraient rapidement : incapables de se nourrir, ou de se défendre contre les bêtes ou les gens, ou de voir le danger. Dans notre société actuelle, heureusement, l'action collective fait que les personnes handicapées peuvent vivre longtemps.*

*Dans l'ancien temps, je serais déjà mort plusieurs fois. D'une part, je suis très myope, et ne pas voir au loin m'aurait sûrement causé de gros ennuis. D'autre part je suis paraplégique, et ne pas pouvoir marcher, avoir souvent des plaies aux fesses et des infections urinaires m'aurait aussi condamné à une mort rapide. Actuellement, grâce à deux accessoires technologiques, des lunettes sur mes yeux et un fauteuil roulant sous mes fesses, non seulement je suis vivant, mais je peux participer presque normalement à la vie sociale.*

*Pourtant, socialement, les deux aspects ne sont pas identiques. Être myope et porter des lunettes n'est pas considéré comme un handicap, contrairement à être paraplégique et être assis dans un fauteuil roulant, qui est un handicap beaucoup plus visible, et donc « important socialement ».*

*La société où nous vivons reconnaît certains types de handicap, par exemple avoir besoin d'un fauteuil roulant pour se déplacer, ou avoir besoin d'une canne pour palper son environnement parce qu'on voit mal ou pas du tout. C'est pour ça que le symbole du fauteuil roulant indique l'accessibilité aux personnes handicapées, par exemple pour les places de stationnement, et que le symbole de la canne blanche indique une adaptation pour les aveugles.*

*Mais ce n'est qu'un petit aspect du problème, car beaucoup de personnes sont handicapées, sans que ça se voie par un fauteuil roulant ou une canne blanche : avoir une mauvaise vue, avoir une mauvaise mémoire, avoir par intermittence des difficultés à marcher ou à saisir des objets...*

*Les « normes » d'accessibilité ont leurs avantages et leurs inconvénients. Lorsqu'elles sont bien appliquées, elles facilitent la vie des personnes concernées, mais lorsqu'elles sont mal appliquées, elles ne sont que des surcoûts sans utilité.*

*Il y a vingt-cinq ans, le lycée où j'enseignais à Marseille a été rénové par le conseil régional, à grands frais pour les contribuables : c'était utile, car il n'y avait pratiquement pas eu de travaux pendant cinquante ans, et déjà, en 1992, la loi prévoyait que les bâtiments ouverts au public*



alirebla per rulseĝo. La respondo estis : « Vi ne bone komprenis la leĝon. Tiu konstruaĵo estu alirebla per rulseĝo, kaj jes, ĝi estas, ĉar oni povas eniri per rulseĝo. La podioj estas alia problemo : ne temas pri alirebleco de la konstruaĵo, sed temas pri adaptigo de la laborloko, kaj tio ne rilatas al alirebleco de tiu liceo. »

Alia ekzemplo, ĉirkaŭ 2010. Mi vizitis novan teknologian halon de supera lernejo pri nutraĵ-industrio : novan konstruaĵon, kun necesejo oficiale uzebla per rulseĝo. Bonege ! Mi tuj provis ĝin, sed, apogante sur la apogilo, tiu stango falis teren. Rigardinte pli detale, mi vidis ke ŝraŭboj estis senpere en la gipso, sen dubeloj. Mi imagas, ke la homo kiu metis la apogilon opiniis, ke neniu uzos tiun necesejon kun rulseĝo, do ke ne utilis bone fiksi tiun neutilan apogilon.

Kaj mi ne plu nombras la necesejojn oficiale uzebajn per rulseĝo, sed fakte ne uzebajn : ŝlositaj, kaj neniu



**La foto montras veturilojn parkumitaj iom (tro) sur la trotuaro, ekster la loko limigita de la estraro. Tio ĝenas iradon de piedirantoj, kaj ankaŭ de stirantoj de malrapidaj veturiloj (rulseĝoj, bebveturiloj, kaj aliaj). Tamen, verŝajne, la aŭtistoj ne parkumis sian aŭton por ĝeni homojn sur trotuaro, sed male por faciligi iradon de aliaj aŭtoj sur la ŝoseo. Kaj se iu metas sian aŭton laŭleĝe sur loko limigita sur la ŝoseo, kiam la aliaj estas sur la trotuaro, finfine, tio ĝenas ambaŭflanke. Kiel malfacile estas zorgi pri ĉiuj malsimilaj homoj !**

sciis kie estis la ŝlosilo, aŭ plenaj de maŝinoj por purigi la plankon...

Fakte, ne facile estas ĉion fari por ĉiaj handikapoj. Kiam oni estas sur rulseĝo, oni bezonas vastajn ĉambrojn, larĝajn koridorojn kaj pordojn. Male, kiam oni malbone sentas ekvilibron, aŭ kiam oni malbone vidas la distancojn, oni bezonas apogi sin sur muroj kaj pertuŝaj gvidsignoj, do oni preferas mallarĝajn irejojn. Blinduloj ne ŝatas la deklivojn faritajn por rulseĝoj : ili riskas iri de trotuaro al ŝoseo senkonscie, ĉar ili ne povas gvidiĝi per la limo de la trotuaro.

Do « normoj » estas ofte malfacile aplikeblaj, kaj ne povas solvi ĉiajn problemojn de ĉiuj « nenormalaj » aŭ « eksternormaj » personoj. La ĉefa tasko estas fari adapteblan socion : tiel ke ĉiuj konstruaĵoj, iloj, ĉiutagaj aĵoj povu adaptiĝi al homoj, kiuj uzus ilin, aŭ povus uzi ilin, kaj ankaŭ ke homoj adaptiĝu al aliaj homoj. Eble tio estas la plej malfacila afero.

**Pierre Dieumegard**

*devraient être accessibles en fauteuil roulant. Avant les travaux, il y avait des estrades en bois, peu pratiques pour un fauteuil roulant. Pendant les travaux, nous nous sommes aperçus que des estrades en béton allaient être mises en place : après quelques plaintes de la part des enseignants, les responsables ont accepté que deux salles d'enseignement soient presque sans estrades. Néanmoins, j'ai téléphoné au service compétent du conseil régional pour savoir pourquoi mettre de grandes estrades dans un bâtiment censé être accessible en fauteuil roulant. La réponse a été : « Vous n'avez pas compris la loi. Le bâtiment doit être accessible en fauteuil roulant : il l'est bien, puisqu'on peut y aller en fauteuil. Par contre l'existence ou non d'estrades, c'est un problème d'adaptation du poste de travail, qui ne relève pas de la loi sur l'accessibilité du bâtiment. »*

*Autre exemple, vers 2010. Je visitais la nouvelle halle technologique d'une école supérieure d'agro-alimentaire :*

**La photo montre des voitures garées en (trop) grande partie sur le trottoir, en dehors des emplacements matérialisés par la mairie. Cela gêne le passage des piétons et conducteurs de véhicules lents (fauteuils roulants, poussettes, etc). Pourtant, il est vraisemblable que les automobilistes n'ont pas garé leur véhicule dans l'intention de gêner la circulation sur le trottoir, mais au contraire pour faciliter la circulation des autres automobiles sur la chaussée. Et si quelqu'un met une voiture sur les places de la chaussée, alors que les autres sont sur le trottoir, finalement, ça gêne des deux côtés. Que c'est compliqué de tenir compte de tous ces humains différents !**

*nouveau bâtiment, avec des toilettes en principe accessibles en fauteuil roulant : pièce assez grande et barre d'appui à côté du siège de WC. Chic ! J'ai voulu essayer, mais en m'appuyant sur la barre, elle est tombée à terre : en y regardant de plus près, les vis étaient directement dans la plaque de plâtre, sans chevilles. J'imagine que la personne qui avait fixé la barre avait considéré que personne ne l'utiliserait jamais, et que ce n'était pas la peine de la fixer solidement.*

*Et je ne compte plus les cabinets de toilette censés être accessibles en fauteuil, et qui ne l'étaient guère : pièce fermée à clé dont on ne savait plus où était la clé, lieu de stockage de machines de nettoyage du sol...*

*En fait, ce n'est pas facile de tout faire pour tous les types de handi-*

*cap. Lorsqu'on est en fauteuil roulant, il faut beaucoup de place, des couloirs et des portes larges. Par contre, lorsqu'on a des troubles de l'équilibre, ou une mauvaise vision et un mauvais repérage dans l'espace, il faut des points d'appui et des points de repère tactiles, donc plutôt des passages étroits.*

*Les aveugles sont gênés par les plans inclinés conçus pour les fauteuils roulants : ils peuvent passer du trottoir à la chaussée sans s'en rendre compte, en ne pouvant pas se repérer par le bord du trottoir.*

*Donc les « normes » sont souvent difficiles à appliquer, et ne peuvent pas prendre en compte tous les problèmes de toutes les personnes « anormales ».*

*L'important est de faire une société adaptable : que les bâtiments puissent être adaptés aux personnes qui les utilisent, ou pourraient les utiliser, et que les humains puissent s'adapter aux autres humains. C'est peut-être le plus difficile.*

**Pierre Dieumegard**

# Lertaĵo por komuniki kun surduloj

Kvankam li uzas aŭdilojn, mia patro ne bone aŭdas, ĉefe kiam li telefonas. Mi loĝas for de lia hejmo. Kelkfoje, li maltrankviliĝas aŭ ne plu trovas ion en sia domo. Li telefonas al mi por demandi ion sed, ofte, li ne bone aŭdas aŭ miskomprenas mian respondon.

Kun miaj gefratoj, ni trovis ideon por komuniki kun li. Ni uzas tabulkomputilon kaj apon « Google Docs ».

« Google Docs » estas rimedo por pluraj personoj, kiuj deziras « labori » sur la sama dokumento. Ĉiu, nomata partoprenanto, povas rekte modifii la tekston.

Mi kreis la « dokumenton ». Miaj gefratoj kaj nia patro estas partoprenantoj.

Mi instalas la tabulkomputilon, tiel ke mia patro ne povas agi (skribi, forviŝi, ktp.).

Mi elŝutis programon, kiu malhelpas malŝaltiĝon de la tabulkomputilo.

Mi elektis grandajn literojn. La mesaĝoj ne povas enhavi pli

ol cent literojn. Tiel, mia patro povas legi la mesaĝojn, eĉ kiam li ripozas sur sia kanapo aŭ iomete malproksime de la tabulkomputilo. Ĉiun tagon, per mia poŝtelefono, mi skribas la daton.

Mi kaj miaj gefratoj, povas skribi informon (skribe respondi al telefona demando, diri je kiu horo mi alvenos ĉe li, ktp.).

Mi instalas la tabulkomputilon en skatolo (ligna skatolo por tri boteloj da vino taŭgas) kaj mi fiksas ĝin sur breto, kiu situas sub la televidilo de mia patro.


La tabulkomputilo ĉiam devas esti konektita.

Nun, mia patro kutimas regule rigardi la tabulkomputilon. Miaj gefratoj kaj mi trankviliĝas.

Eble ekzistas aliaj rimedoj por ebligi la komunikadon kun malaŭduloj, sed tiu-ĉi estas praktika por ni.

Jen foto antaŭ ol mi enmetis ĝin en la skatolon.

**Brigitte Ardon**



## Transportoj kaj handikapo, Parizregione

Ni pli bone komprenis la problemojn, kiujn gravaj handikapaj personoj renkontas pri transportoj, kiam ni invitis amikino de nia nevo, kiu estas en fotelo, ĉar ŝi ne povas paŝi, kaj plie devis esti tre atenteme transportata, ekzemple por suprenkaj malsupreniri ŝtuparon, pro sana risko.

Ŝi kutimis kaj indikis al ni la plej proksiman taŭgan tiaman RER-stacion, kiu enhavas lifton; tiam ne ĉiuj metroaj stacioj tion posedis (laŭ RATP en 50 % de la kazoj, ĉar la « grujera » pariza grundo malebligas liftoinstaladon), kaj foje necesis plilonge vojaĝi por trovi taŭgan ŝanĝebligan stacion inter diversaj linioj.

Poste, hejme, du viroj pene interhelpiĝis por suprenirigi ŝin unuetaĝen, atentemaj pro la riskoj.

Tiuteme, kiam ĉe France 3 (Pariza eldonaĵo), lastan 20an de oktobro, temis pri la pariza or-

ganizo prie, mi notis la informojn cele tiun artikolon.

Iu juna virino en fotelo diris ke handikapa persono bezonas jam pli da tempo por fari kutimajn gestojn, ke vojaĝo tra Parizo estas vera ekspedicio. Ŝi aldonas ke se jam estas kelkaj pliboniĝoj: plifacila enirado en busojn, kiuj nun centprocente estas ekipitaj per malaltaj plankoj (ĉar malfacilas ekipi ĉiujn metroajn staciojn, RATP privilegias surfacan reton, interalie la kvin novajn tramajn liniojn), lumaj kaj sonoraj informoj, ebleco per telefona programeto voki iun oficiston por helpi en stacio, linio 14 komplete ekipita de ĝia kreo (tamen, uzantoj plendas pro oftaj liftopaneoj kaj nesufiĉe larĝaj latispordoj por foteloj, kiuj postuligas alvokon de oficisto), stacio provcele aparte ekipita (ekz. Reuilly-Diderot)... ankoraŭ restas multego por fari. Estas aliaj eblecoj, sed foje pli kostaj.

Siaflanke, ŝi rete kreis paĝaron, kiu de tri jaroj estas bone uzata, por interhelpo de personoj kiuj posedas vehiklon adaptitan por handikapo (kun deklivo, adaptita por stirado...) kiuj konsentas ludoni ilin, kiam ili ne ĝin uzas.

Pri helpo al intelektaj handikapitaj personoj, akceskomisiono de RATP zorgas por inkludi ĝin en klerigvidlibron de siaj oficistoj.

Tia problemulo tuŝas ne nur gravajn handikapulojn, la mallertaj marŝantoj estas helpitaj de preskaŭ 900 rulŝtuparojn (200 antaŭviditaj antaŭ 2020), sed kiuj estas iom riskaj ĉe malsuprenirado. Tamen, plie en la koridoroj fojfoje sinsekvas supreniradoj kaj malsupreniradoj, tre penigaj.

Ĉe la reto, eblas trovi multajn informilojn, kalkuli eblan itineron... tio postulas gravajn kaj malfacilajn studojn por bone informiĝi kaj uzi.

**Tereza**



# La nesuspektitaj kapabloj de la arboj

La freŝdataj malkovroj pri la arboj bildigas fascinan mondon. Jen ekzemploj kaj anekdotoj pri tio.

La kuduoj, tute ne propra-vole, atentigis nin pri la arboj. Kiam oni provis bredi tiujn antilopojn, oni konstatis ke ilia kutima manĝaĵo, folioj de akacio, toksis ilin. La enigmo estis finfine solvita de la profesoro Van Hoven el la universitato de Pretorio (Sudafriko) : kiam la akacio estis ekpinĉitaj, ili protektis sin fabrikante toksajn taninojn kaj avertis siajn najbarojn eligante gason kiu, disportata de la vento, ebligis al la aliaj akacioj antaŭscii pri la alveno de antilopoj. La arboj komunikas : tiu revolucia malkovraĵo, antaŭ trideko da jaroj, spronis la sciencajn esplorojn, kaj de tiam, la arboj daŭre surprizigas nin.

## La gasoj, mult-funkciaj iloj de la arboj

Oni nun scias ke tiu komunik-rimedo de akacioj estas same uzata de aliaj arboj. Tiuj gasoj, kiuj ĝojigas niajn naztruojn en la vegetalaj esencoj, apartenas al la familio de vaporigemaj organikaj kombinaĵoj. Ili iel estas la mult-funkciaj iloj de la arboj. Ili uzoj estas tre diversaj kaj mult-nombraj : sendi alarmo-mesaĝojn, ŝpari akvon, forpeli ĝenajn insektojn aŭ allogi utilajn. Ili eĉ ebligas venigi pluvon ! Inter tiuj gasoj, la terpenoj (1) eligitaj ĉefe de koniferoj, leviĝas alten en l'atmosfero, kie ili helpas al dikiĝo de la nuboj super la arbaraj zonoj, tiel faciligante kondensadon de akvo-gutetoj. Pro tiu impresa kapablo, la arboj meritus esti agnoski-

Cet article est tiré de la revue Silence (n° 471) et de son dossier d'octobre 2018 « L'arbre, cet allié méconnu ». Publiée depuis 1982, Silence est la plus ancienne revue écologiste française. Il s'agit d'un mensuel papier qui traite de l'écologie sociale, de la non-violence et de la décroissance. Revue militante, elle est axée sur la présentation d'alternatives concrètes. Elle fonctionne de manière participative, est gérée par une association et 100 % indépendante, sans affiliation politique, sans publicité ni subvention.

Numéro découverte disponible gratuitement sur simple demande.

Silence, 9, rue Dumenge,  
69317 Lyon Cedex 04 ;  
tél. : 04 78 39 55 33.

www.revuesilence.net.



*Tre maljuna dornstrobila (bristlecone) pino, en la dezerto de Moab en Utaho. En Kalifornio, unu el tiuj arboj jam estis multcentjara dum la konstruado de la piramidoj en Egipto.*

taj kiel grandaj gardantoj de la klimato.

Bedaŭrinde tiuj vaporigemaj organikaj kombinaĵoj emas bruli ; la cipresoj certe jam komprenis tion. Francis Hallé (2), brila ambasadoro de la arboj, kiu tre frue antaŭsentis ties mirindajn kapablojn, klarigas ke post arbar-brulegoj en Hispanio, oni malkovris ke cipresoj ne brulas. Ilia defend-sistemo estas majstra : kiam ekvarmegas, ili forvaporigas ĉiujn siajn kombinaĵojn portempe embarasajn. Ili tiel avertas siajn samspeciajn, starantaj sub la vento, t.e. laŭ la direkto de la incendia antaŭeniĝo. Tiuj ĉi, tiel, havas tempon por bone prepariĝi kaj, je ĝia alveno, la fajro renkontas nur « sakojn plenaj je akvo » kiuj travivas la incendion sendamaĝe, kompreneble avertinte intertempe aliajn cipresojn.

## Subtera komunika reto

Ekde la eldono de la libro de Peter Wohlleben, *la Vie secrète des arbres* (la sekreta vivo de arboj), ilia kapablo kunligiĝi ankaŭ per siaj radikoj estas sufiĉe konata. La fungoj, kies videblan parton ni ŝatas en omleto, estas ĉefe konstituitaj el micelio, subtera reto de fadenetoj, kiu nun estas agnoskita kiel perilo por tiuj interŝanĝoj. La arboradikoj estas konektitaj al micelio de fungoj pere de mikorizoj : tiu ligilo donas al la arboj la eblecon transporti nutraĵojn aŭ ĥemiajn mesaĝojn laŭ longaj distancoj. La interŝanĝoj povas ankaŭ okazi inter divers-speciaj arboj, kiel elmontris la Kanadino Suzanne Simard ; aliflanke, arbo ankaŭ povas agi favore al kreskaĵoj el siaj propraj semoj, kiel elmontris la Skoto Anthony Trewavas. Koncerne fungojn, ili profitas je sukeroj fabrikitaj de la arboj : tiuj interŝanĝaj komplezoj pliriĝigas ambaŭ.

Arboj montras ankaŭ perceptokapablojn. Ekzemple oni scias ke ili re-

konas iujn kolorojn, sentas venton, perceptas sian ekvilibron. Plie, ili adaptiĝas lerninte de la pasintaj spertoj, en tia grado ke oni hodiaŭ parolas pri « inteligenteco de arboj ». Tiu ĉi vorto ankoraŭ estas pridiskutata, kiel kutime kiam oni provas analogii inter estaĵoj tiel malsimilaj kiel arboj kaj homoj. Tamen temas nur pri difino de la vorto « inteligenteco », difino en kiu la homo estas samtempe juĝanto kaj juĝato, kiel rimarkigas Francis Hallé.

## Pasifloro kaj bambuo

Francis Hallé raportas al ni pri eksperimento kiu evidentigas la realecon de tiuj percepto-, memoro- kaj lerno-kapabloj : kiam oni metas bambuon apud pasifloran plantidon, tiu ĉi etendas ĉiron al la bambuo por kroĉiĝi al ĝi. Kiam oni translokas la bambuon antaŭ ol la ĉiro trafos sian celon, la pasifloro deŝovas sian ĉiron direkte al la nova loko de la bambuo. Eĉ pli mirinde : post kvin aŭ ses translokoj de la bambuo laŭ la sama direkto, la pasifloro anticipas la agon modifante la direkton de la venonta ĉiro, eĉ antaŭ la transloko de la bambuo. Konklude, se la planto ne

(1) *Tiuj estas hidrokarbonoj entenataj en vegetaĵoj, ofte konsistigante ties odoraĵojn (terebintino, kamforo, mentolo, citronelo). Iuj havas gravan biologian funkcion (hormonoj, vitaminoj).*

(2) *Francis Hallé, botanikisto kaj biologo, estas fakulo pri ekologio de la humidaj tropikarbaroj kaj pri arba arkitekturo. Li estas fervora defendulo de la arboj. Li i.a. publikigis Elogio de la plante, pour une nouvelle biologie (Laŭdo de la planto, por nova biologio), Le Seuil, 1999 kaj Plaidoyer pour l'arbre (Pledo por la arbo), Actes Sud, 2005, premio « Homme et botanique » (Homo kaj botaniko).*

▶ estas inteligenta, ĝi tutcerte ne estas stulta !

Iu brila sci-povo ĝenerale nekonata kaj same mirinda de arboj estas ilia vivdaŭro. Ni emas taksi maljunaj centjarajn arbojn. Tamen je tiu aĝo, ĉe multaj specioj, ili estas nur junuloj. Kverko povas vivi pli ol mil jarojn, olivarbo aŭ ginko biloba pli ol dumil. Ekzistas en Kalifornio « bristelcane » (dornstrobila) pino, kiu superas kvinmil jarojn. Fenomene ! Tamen arbo povas fari eĉ multe pli. Regenerigante el siaj radikoj, kvazaŭ per stikado, arbo kreas klonajn koloniojn : arojn da arboj idoj de ununura individuo, kiuj havas komunan radik-reton (kaj komunan genaron), renoviganta ĉiuprintempe. Science fi-

## Ni volas papavetojn

Alvoko por malpermeso de ĉiuj sintezaj pesticidoj.

Pesticidoj estas venenoj kiuj detruas ĉiujn vivantaĵojn.

Ĉie ili estas, ĉu en pluvo, en matenroso, en florsuko, ĉu en stomako de abeloj, en funiklo de la ĵus naskitaj beboj, en birdnestoj, en la lakto de patrinoj, en pomoj kaj ĉerizoj.

Por la sano, pesticidoj estas tragedio. Ili kaŭzas kanceron, Parkinson-malsanojn, psikomovajn perturbojn ĉe infanoj, malfekundecojn kaj denaskajn misformaĵojn.

Pesticidumado estas subkonsiderata de absurda sistemo, kiu preferas balai ĝin sub la tapiŝon.

Kiam iu pesticido estas malpermesita, tuj dek aliaj anstataŭas ĝin. Estas miloj da ili.

Nian landon ni ne plu rekonas. Naturo estas kripligita. Malaperis la triono de la birdoj en dek kvin jaroj ; la duono de la papilioj en dudek jaroj ; miliardoj da abeloj kaj aliaj polenantoj mortas ; ranoj kaj lokustoj ŝajne malaperis ; sovaĝaj floroj rarigas.

Tiu malaperanta mondo estas nia, kaj ĉiu mortanta koloro, ĉiu estingiganta lumo estas definitiva doloro.

Redonu al ni niajn papavetojn ! Redonu al ni la belecon de l' mondo !

Ni postulas de nia registaro la malpermeson de ĉiuj sintezaj pesticidoj en Francio.

Tuj ĉesigu paroladon ! Ekagu !

**Lucette Lejeau kaj la tuta grupeto de La Roche-sur-Yon**

dinda datumo taksas klonan kolonion de reĝa ilekso, en Tasmanio, 43 000 jaraĝa. Tamen, ŝajnas ke la rekordo apartenas al klona kolonio de poploj, specio kies individuoj apenaŭ vivas pli ol cent jarojn. En Utaho, tiu kolonio, nomata Pando, aĝus proksimume

80 000 jaroj. Malfacilas precize taksi ĝian aĝon : opinioj varias inter kelk-miloj kaj... unu miliono da jaroj. Indas esti humila antaŭ tiaj nekredoblaj estaĵoj, la arboj.

**Philippe Crassous**

## Fumado kaj libereco

Certe, malpermesi fumadon estus atenci liberecon, kiel skribas R. Platteau (La Sago sept./okt. 2018), sed permesi fumadon en publikaj lokoj signifas liberecon al fumantoj trudi sian fumon al aliuloj. Ĉu libereco devas forigi ĉiun limon ? Do, sekvante tiun rezonadon, se iu ne plaĉus al mi, mi havus la rajton tranĉi al li la kolon.

Mi, iomete anarkiista, sentas ke mia libereco finiĝas tie, kie komenciĝas tiu de aliuloj. Foje oni aŭdas « ne faru al aliuloj tion, kion vi ne ŝatus ke oni farus al vi ». Mi aldonas « faru al aliuloj tion, kion vi ŝatus ricevi de ili ». Do, en publika loko, mi ne trudu la aliulojn spiri mian fumon. Nature, se la konscienco de ĉiuj unuopuloj estus sufiĉe disvolvita, ne utilis leĝo. Sed, jam, tio ankoraŭ ne alvenis.

Mi eĉ vidas kelkajn leĝojn tute ne celantajn protekti aliulojn de mia

misfaro, sed ŝajnante protekti min mem, ekzemple la sekurzonon en veturiloj. Pri tio, neniu parolas.

Alia erodado de libereco okazas, tute akceptita de homoj ne rimarkantaj ke ili tiel submetiĝas al modo, Dioprogreso kaj ekranoj ligitaj al interreto. Baldaŭ ĉio farendos per interreto, eĉ por iri al necesejo ni havu elektronikan ŝlosilon. En mia vilaĝo ekaperas « inteligentaj rubujoj » ekipitaj de elektronika fermilo postulantanta blatslosilon al ĉiu loĝanto.

Ankaŭ « inteligentaj elektraĵoj » komputiloj « Linky » invadas loĝejojn.

Foje, libereculo volas rajte spirigi sian fumon al ĉiuj, sed akceptas minusigantan penson, sekvante la « oficialan » disdonitan de televido kaj aliaj ekranoj, kaj ankaŭ, pli bedaŭrinde, foriron de sentemo vidita kiel malforto per racio kvankam ĝi estas homa riĉeco. **M.M.**

## Anekdotoj pri fumado

La teksto de R. Platteau pri tabakfumado (La Sago n° 123, p. 3) memorigis al mi anekdotojn, kiujn mi travivis.

Kiel li, mi ĉiam estis ĝenata pro fumado (mi havis ŝancon, ke kiam sesdekjaraĝa, geamikoj proponis mian unuan cigaredon, tio neniam allogis min).

Kiam mi eniris restoracion, plejofte fumanto apudis min ! En sindikataj kunvenoj, plejparte de la ĉeestantoj fumis...

Eĉ iam en parizregiona kastelo, kie okazis sindikata kurso, mi sciencistulte sidiĝis apud malferma fenestro por plibone spiri ! Sed, mi metis min en kamenon ! Ĉiuj fumo trankvile direktiĝis al mi antaŭ ol trafi fenestron !

Tiu ĝeno pro fumado antaŭlonge helpis min konatiĝi kun Polino, Tereza. Tiam aperis nova esperanto gazeto (eble « Ovo » n° 1 ?), en kiu ŝi aperigis artikolon pri sia ĝeno pro fumantoj en esperantokunveno. Ŝi imagis iun strangan reagon, kiu ebligis ŝin ne grumbli. Ŝi provizis sin per boteleto da amoniako kaj kiam post sidado ĉirkaŭ tablo por kunveni, pluraj ekfumis, ŝi trankvile verŝis iom da likvaĵo sur naztukon kaj diris « Vi pardonu al mi ! sed mi

ne povas elteni sen tiuodoro, kiun mi ĵus malkovris kaj tiom plezurigas min ! ». Mi skribis al ŝi kaj, de tiam, komencis inter ni leteraj rilatoj, kaj poste, ŝia vizito al ni kaj ni al ŝi en Varsovio !

Tamen, tiu ĝeno kostis al mi. Ĉiam en sindikata parizregiona kunveno, iun tagon, mi devis eliri la salonon kaj restadi la tutan kunvenon en apuda ĉambro, ĉar mia veturilo estanta en garaĝo por riparo, amikino transportis min, do mi devis atendi ŝin por rehejmeniĝi. Do antaŭ fino de la kunveno, mi revenis por klarigi al la grupo mian ĝenon kaj proponi : « Ĉiujn fojojn, se vi bonvolas ne plu fumi interne, mi alportos al vi kafon kaj bulkojn por danki vin ».

Pro ĉies konsento tion mi faris dum pluraj jaroj !

**Tereza**





# Memoraĵo pri vojaĝo al SAT-kongreso 2018 en Kragujevaco (Serbio)

## Sabaton (4an de aŭgusto)

Je la 11a mi forpiediras el mia hejmo ĝis la stacidomo. Tra la belfortaj stratoj mi paŝas de ombrozono al alia ombrozono. Ĉar tiel ega estas la varmeco, ke mi nepre evitas longtempe paŝi sub la suno. Bonŝance, en la stacidomo de Mulhaŭzo mi trovas ne tro varman atendejon.

Elirante la trajnvagonon en Strasburgo (35 °) mi hazarde renkontas belfortan amikon, kiu miras ke mi vojaĝos en Serbion per buso. Ĝis la foriro de lia trajno, ni iomete babilas pri Esperanto. Mi nun devas trovi tramon por atingi Kelon ĉe Rejno, en Germanujo. Pluraj biletaŭtomatoj paneas, mi finfine sukcesas aĉeti trambiletan.

Sole mi atendas sur la trotuaro apud ŝildo de « Flixbus » malproksime de la stacidomo en Kelo. Aliaj ŝildoj informas pri ne plu validaj haltejoj de urbbusoj. Tiu haltejo ŝajnas ne koncernita. Sur mia poŝtelefono mesaĝo anoncas malfruecon de 35 minutoj, sed nuntempe eĉ kalkulante kun tiu aldona tempo, la buso devintus alveni... ĉu mi eraras pri la loko? Kial neniu alia persono atendas ĉi tie? Ĉu ankaŭ tiu haltejo ne plu validas?

Mi denove studas la malgrandan mapon sur la poŝtelefono, relegas la per germanlingvan skribitajn informojn de la apudaj haltejoj. Kial mi estas sola? Se mi erarus? Kion mi farus se mi maltrafus tiun buson, ĉu mi trovus ankoraŭ trajnojn? Ĉu petveturadi? Nokte petveturadi? Kie aĉeti taŭĝan mapon? Finfine la buso alvenas! Restas nur unu sidloko en ĝi: la mia. Tial mi atendis sole.

La libera sidloko situas apud la seĝo de afabla kvardekkvina kroata virino. Ni agrable babilas. Kiam ŝi estis deknaŭaĝa ŝi edziniĝis kun franca militisto de la Kafor, vivis en Francio, kaj nuntempe havas albanan koramikon, kiun ŝi renkontos apud Ulm. Mi parolas al ŝi pri Esperanto kaj pri la venonta kongreso en Kragujevaco. Ni babilas ankaŭ pri rifuĝantoj. Laŭ ŝi, Serbio estas tre malriĉa lando, kaj mi estos surprizita.

## Nokton

Seĝoj liberiĝis, mi povas sidiĝi apud Lumeto (Lucette), rakonti pri miaj

zorgoj en Kelo. Ŝi diras, ke en Strasburgo afabla familio gvidis ŝin de trajna al busa stacidomo. De la klimatizita buso, ankoraŭ je la 19a, oni legas, ke ekstere daŭre varmegas je 37 gradoj.

Mi ŝatas la etoson en la buso. Multaj ĝojaj junuloj vojaĝas kun ni. Nokto alvenis kaj ni pripensas la dormon. Kelkajn obstaklojn mi malkovras:

1. Klimatizo iomete tro malvarmigas la aeron, puloveron mi lasis en valizo, kiu kuŝas en la holdofako.

2. La buso ofte haltas, personoj foriras kaj aliaj eniras, ĉiufoje tio okazigas fortan lumon.

3. La buso estas plenplena: proe, meze de la nokto, en la aleo, mi pozas mian piedon sur... moviĝantan kovrilon!

4. Multaj homoj kelkfoje laŭte babilas. Bonŝance tiu babilado ŝajnas al mi kiel lulkanto, kaj dum tempopartetoj mi sukcesas dormi.

## Dimanĉon (5an de aŭgusto)

En Budapeŝto, ni spertis absurdajn situaciojn pro miskompreno kaj eble pro nehelpemo de kelkaj homoj, sed ni finfine trovis la informon pri la taŭĝa bushaltejo.

Franca-serba afabla junulo nuntempe sidas apud mi de Budapeŝto ĝis Beogrado. Ĉiusomere li ferias kun sia familio en serba vilaĝo. Li entuziasme parolas pri Kragujevaco kaj klarigas kial, laŭ li, Serbio ne pretas eniri Eŭropan Union: unue pro la afero de memseksedziĝo, due pro la rajto memfari alkoholon, kaj trie pro la sendependeco de Kosovo. Transiri la limon daŭras multe da tempo: estas veraj doganistoj, kiuj

kontrolas. Ni fakte eliras la Ŝengenpacon.

Malfacilajn taskojn ni spertis en la busstacidomo de Beogrado. Necesis ŝangi eŭrojn kontraŭ dinaroj kaj strange aĉeti suplementan enirbiletan « kajbileto », malgraŭ ke ni jam posedas taŭĝan transportbiletan, kaj ankaŭ pagi por la bagaĝoj.

Bonŝance afabla deĵoristino bonvolas ŝanĝi mian monon, por ke ni foriru pli frue. Tra la busfenestroj, ni ŝatas malkovri serban kampadejon: kultivado ŝajnas pli diversa ol en Hungario (*legu ĉi-malsupre*). Mi ankaŭ ripozas kaj iomete dormas.

Vespere en busstacidomo de Kragujevaco junulo klarigas al ni, per la angla lingvo, la vojon por atingi la kongreshotelon, sed finfine li akompanas nin ĝisfine, ciceronante kaj tirante la valizon de Lumeto. Ni invitas lin viziti la Kongreson dum la venonta semajno.

La interkonatiĝa vespero preskaŭ finiĝas kiam ni finfine alvenas la Kongresejon, lacaj sed feliĉaj pro tiu longa sed bela vojaĝo.

La venonta SAT-Kongreso, en Barcelono, estos pli facile atingebla, almenaŭ por Francoj.

## Viditaĵoj tra la fenestro

• Dum traĵiro de Hungario:

– Maizo, sunfloroj... maizo, sunfloroj... senĉese dum centoj da kilometroj. Kaj neniu bredadan beston, ni ekvidis!

– Sinsekvadas vilaĝetoj, samaj tiel tiuj de Vendeaj marĉoj.

– Unu aŭ du domoj ĉirkaŭitaj de kelkaj arboj videblas, meze de nenio en la ebenaĵo.

• Proksime de Beogrado:

– Kanalo longiĝas, sen iu arbo laŭlonge de siaj bordoj.

– Komence de urbeto, videblas kelkaj altaj domegoj, familia parko, iu « Mac Do ».

– Poste, grego da ŝafoj, apud rivereto; montetoj je distanco de proksimume 20 kilometroj...

• En Serbio:

– Pli ĝenerale, ni vidis kultivaĵojn kaj bredaĵojn multe pli diversajn.

– Sur la lokaj bazaroj, troviĝas framboj, figoj kaj aliaj fruktoj gustoplenaj kaj freŝaj.

Anino Griffon



# De la vortlesivado al la cerbolavado

## De la lessive des mots au lavage des cerveaux

« Plibonigu viajn kompetentecojn pri trading (1) » diras anonco ĉe « Radio Classique » (Klasika Radio).

Kvankam tiu propono ne persone koncernas min, la esprimo atentigis min.

Ne estas certe, ke ĝin tuj spontane komprenas ĉiuj. Sufiĉas, ke ĝin komprenu tiuj, kiuj devas senti sin koncernataj, la « iniciatoj », la virtuala merkato de la akcietoj. En la angla, la ĝenerala signifo de « trading » estas komerco, negoco. La aparta aktiveco, konsistanta en aĉeto kaj vendo de borsaj valoraĵoj estas « stock exchange trading »(2). Sed ŝajnas ke, en la hodiaŭa franca lingvo, tiu speciala senco ligiĝas al la vorto « trading ».

Al ni tamen ne mankas vortprovizo por nomi tiun aktivecon. Oni povus tute neŭtrale diri « viajn borsajn kompetentecojn ». Aŭ, iom malpli neŭtrale : « Lernu kiel pli bone ludi en borso ». Sed, se la afero estas precize nomi tiun transakcian agadon, neceso diri : spekulado. Tio ĉi sonas malbone kaj « afiŝas » vin, kiel francoj hodiaŭ diras. Komprenoble, spekulado enhavas pejorativan kromsencen. Estas aliaj vortoj, sed pli malbonaj... kia « aĝiotado », laŭmoda vorto dum la periodo de la Franca Revolucio por kvalifiki la akaparistojn, kiuj pliriĉiĝis dank'al negoco de valoraĵoj kaj varoj. « La uzuristoj, kiuj estis multe gajnintaj en finegoco de la reĝaj paperoj, oni nomis tiujn personojn « aĝiotistoj » skribis Saint-Simon (citaĵo el la vortaro « Le Robert »). Eblas ankaŭ diri « fibrosludo », por paroli pli precize pri etaj ludantoj en Borso. Sed tio ne aspektas tre serioza, tro proksima al « finegoci », eĉ amatori.

Ĉiel ajn, franclingve, la vortoj pri borsa spekulado jam de longe havas pejorativan kromsencen. Eble tio estas ligita al la fakto ke la burĝaran regadon jam de origino akompanis forta kritiko kontraŭ tiu burĝaro.

Tial utilas sin turni al la angla. Tio aspektas pli moderna sed ankaŭ pli teknika, pli neŭtrala. Oni mezuras per tiu ekzemplo, ke la « granda anstataŭigo » de la franca vortprovizo, kiun hodiaŭ ni konstatas, estas iuflanke operacio celanta ideologian purigadon. La realeco de kapitalismo ne ŝanĝiĝas, sed la vortoj ĝin taksantaj estas recikligataj, renovigataj, purigataj. Gravus la vortoj. Kaj la vortoj, kiujn ni importas, portas kun si ideologion. Jen la granda lavado de la vortoj. Kaj de la lavado de la vortoj al la lavado de la cerboj, la distanco ne estas longa.

Feliĉege « la realo estas tie », kiel diras poeto Laurent Fourcaut. « La faktoj estas obstinaj », diris iu Lenino.

El « l'Humanité » de jaŭdo, la 31a de januaro 2019, rubriko « Débats & Controverses », kroniko de Francis Combes kaj Patricia Latour, franca titolo : « De la lessive des mots, au lavage de cerveau », tradukis Jocelyne Monneret.

(1) trading : tiu barbarismo apartenas al la franca borsa ĵargono. En la angla, ĝia signifo estas « komerco », interalie « komerco pri borsajoj ». La franca borsa ĵargono konservas nur tiun ĉi specialigitan sencen.

(2) stock exchange trading : (anglalingve) borsa komerco.



« Améliorez vos compétences en trading », dit une annonce entendue sur Radio Classique. Bien que pas personnellement concernés par cette offre, la formule a retenu notre attention. Il n'est pas sûr qu'elle soit spontanément comprise de tous. Il s'agit simplement d'être compris par ceux qui doivent se sentir concernés, les « initiés », le marché potentiel des petits actionnaires.

En anglais, « trading » signifie de manière générale commerce, négoce. L'activité particulière qui consiste à acheter et à vendre des valeurs en Bourse est le « stock exchange trading ». Mais il semble que, dans le français d'aujourd'hui, ce soit ce sens qui s'attache au mot « trading ».

Nous ne manquons pourtant pas de vocabulaire pour désigner cette activité. On aurait pu dire de manière très neutre « vos compétences boursières ». Ou, de manière déjà moins neutre : « Apprenez à mieux jouer en Bourse. » Mais s'il s'agit de qualifier d'un nom précis cette activité de transaction, il faudra dire : spéculation. Ce qui la fiche mal et vous « affiche », comme on dirait aujourd'hui. Spéculation a évidemment une connotation péjorative. Il y a d'autres mots, mais c'est pire... Tel « agiotage », mot en vogue pendant la période de la Révolution française pour qualifier les accapareurs qui s'enrichissaient sur le trafic des valeurs et des marchandises. « Les usuriers qui avaient gagné gros à trafiquer les papiers du roi, on appelait ces gens-là des agioteurs », écrivait Saint-Simon (cité par le Robert). On peut aussi dire « boursicotage », pour parler plus précisément des petits joueurs en Bourse. Mais ça ne fait pas très sérieux, trop proche de traficoter, voire de bricoler.

Quoi qu'il en soit, en français, les mots désignant la spéculation en Bourse ont depuis longtemps une connotation péjorative. Sans doute est-ce lié au fait que le règne de la bourgeoisie s'est accompagné, depuis l'origine, d'une forte critique envers cette bourgeoisie.

D'où l'utilité de recourir à l'anglais. Cela fait plus moderne, mais aussi plus technique, plus neutre. On mesure à cet exemple que le « grand remplacement » du vocabulaire auquel nous assistons aujourd'hui est pour une part une opération de blanchiment idéologique. La réalité du capitalisme ne change pas, mais les mots le désignant sont recyclés, blanchis, nettoyés. Les mots importent. Et ces mots que nous importons portent avec eux une idéologie. C'est la grande lessive des mots. Et de la lessive des mots au lavage de cerveau, il n'y a pas loin.

Fort heureusement, « le réel est là », comme dit le poète Laurent Fourcaut. « Les faits sont têtus », disait un certain Lénine.

Source : chronique de Francis Combes et Patricia Latour dans l'Humanité du 31 janvier 2019.



# Libro vivas pli longe ol unu sezonon...

**Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara-kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.**

**Kvazaŭ ĉio dependus de mi**, romano de Trevor Steele, FEL 2009, 343 paĝoj.

La romano baziĝas grandparte sur la vivo de Carl von Ossietzky, ĵurnalisto, unu el la fruaj viktimoj de la nazioj.

En ĉi romano la ĵurnalisto nomiĝas Kurt Lenz. La rakontanto estas amiko de Lenz, de la infanaĝo, Erich Schwalbe, naŭdekkvarjara, kiu vivas en Aŭstralio... Kurt Lenz estas balbutulo, sed mirinde verkas. Tiel bone, ke iam en la lernejo profesoro ne volas kredi, ke Kurt mem verkis eseon. Sen la konvinka helpo de sia amiko Erich, li ricevintus la noton 0 pro malhonesteco! Jam en tiuj jaroj en gimnazio, la rasista veneno de Hitlero ekaperas kaj jam Kurt Lenz kontraŭbatalas ĝin.

Dum la unua mondmilito, kiun li partoprenis, Kurt skribis multajn leterojn. En la lasta li fine skribas: « Jam mortis milionoj vane. Ni diru ne al ĉiu milito ».

Post la milito Kurt verkas artikolojn en pluraj gazetoj kaj samtempe laboras en urbodomo. En 1923 li anoncas al sia edzino, ke li intencas ekŝiĝi el sia posteno kaj vivteni la familion per ĵurnalismo.

Li iras en Bavario por ĉeesti proceson de faŝistoj, kiuj atakis Felix Holzmann, sepdekjara. Proceso kiu iĝos farso. Poste Kurt konvinkas sian amikon Erich intervjui Hitleron en prizono, kie li estis post la fiaska puĉprovo de 1923.

Sed venas « La revo de lia vivo »: Kurt iĝas ĉefredaktoro de nova semajna gazeto Novaj Folioj, kies estro estas riĉa judo, Jacob Siegfriedsohn. Tre avangarda estas la gazeto, kiu kampanjas por rajtoj de samseksemuloj, por reformo de la justicistemo, por abolo de la mortpuno, por plihumanigo de cirkonstancoj en malliberejoj, kontraŭ rasismo kaj militismo. La ĵurnalistoj de Novaj Folioj konstante admonas la socialdemokratojn kaj komunistojn al kunlaboro kaj konscio pri la danĝeroj el la dekstra flanko.

Sed ĉio vanas, kaj la 30an de januaro 1933, Hitler iĝos kanceliero.



De tiu tago ĉiu espero estis for, unu post la alia la nenaziaj gazetoj estis malpermesitaj. Multaj ĵurnalistoj foriras alilanden, nur Kurt rifuzas forlasi sian landon « kvazaŭ ĉio dependus de li »... Ŝajnas ke la barbarecon de la nazioj li ne kapablis imagi...

Certe la plej forta romano de Trevor Steele, kie oni spektas la insidan progreson de naziismo, kie oni kunvivas kun progresemaj homoj, kiuj batalas per sia plumo por montri al siaj samlandanoj la danĝeron de rasismo, de naciismo, de fanatika kredo je iu « savanto ». Legenda libro!

## Barbareco triumfanta

La vesperon post la kancelieriĝo de Hitler, Gustl renkontis min antaŭ restoracio. Ni ambaŭ sciis, ke temas pri serioza diskuto, ĉu niaj rilatoj estas daŭrigindaj.

Kiam ni trovis nin antaŭ Restaurant zum Löwen mi tuj rimarkis ke ŝi surhavas hele ruĝan lipŝminkon. Sendube ŝi sciis, ke tiu koloro plaĉas al mi – fakte ĝi memorigis min pri la vervaj koloroj de Claudia. Ĉu do ŝi serioze volis teni mian intereson? Neniam mi vidis ŝin tiel altira. Estis malvarma vespero, probable 4 gradoj sub nulo, kaj la tento kunpremi niajn korpojn des pli forta.

Dum ni staris ekstere kaj legis la menuon, nia kolego Bertram Holl vidis nin kaj kriis, « Erich, venu – kaj ankaŭ vi, Gustl! Okazas io vere unika! »

Estis urĝa tono en lia voĉo, sed li rifuzis klarigi. Ni sekvis liajn rapidajn paŝojn kaj troviĝis en strateto apud la Kaiserhof. « De tie ĉi ni povos bone vidi, » li diris.

Alte sur balkono de la Kaiserhof staris la nova kanceliero, tuj rekonebla malgraŭ tio, ke li estis vestita « civile », ne en sia « silka pijamo ». Iom lace li tenadis la brakon alte en pli-malpli faŝista saluto. Krom la Charlie-Chaplin-liphararo nenio elstaris ĉe li.

Sed ne li altiris nian atenton. Li redonis la saluton de miloj kaj miloj da marŝantoj, pluraj kolonoj da brunĉemizuloj kaj nigraĉemizuloj en vicoj ŝajne senfinaj. Ili kantis, kriis « Heil Hitler! », braksalutis aŭ svingis la pugnojn en agresa triumfegesto. Sed per la maldekstra mano ili ĉiuj tenis brulantan torĉon, kreante etajn flakojn en enorma maro da fajro. Kaj tiu fajro, praa simbolo de la naturfortoj sed ankaŭ de la homa regado de la naturo, efikis sorĉe. La kontrasto inter la morda malvarmo kaj la varmo de la fajrolago aldonis al la sorĉo.

Tiu multmilkapa procesio estis unueca en sia sento de venko, de celo fine atingita post longa luktado kaj multaj desapontigoj. Kelkaj kantis « Hodiaŭ apartenas al ni Germanio, morgaŭ la tuta mondo! » Sensenca militkanto, fakte danĝera sensensaĵo, sed malfacilis rezisti la kuntiran potencon de tiom da homoj ĝojantaj, marŝantaj, kaj triumfantaj.

## Sen ajna persona atako

Iam virino eksedziniĝis pro la fakto ke ŝia edzo estis iom tro virvirece trudema. Post divorco, li malaperis, kaj oni ne plu aŭdis pri li. La virino aranĝis sian vivon kun alia kunulo, ja ne sen malvirtoj, tamen iom pli akceptebla – neniu estas perfekta, ĉu ne?

Okazis ke pli ol dek jaroj post la divorco, iun tagon reirante hejmen, la virino sin trovas fronte al sia eksedzo staranta meze de la salono.

– Mi alportas bonan novaĵon, diris li, vi ĵus heredis grandan sumon!

Jen demando al vi, karaj legantoj:

Kiu, laŭ vi, estis la tuja respondo de la virino:

Ĉu: « Bonege! De kiu? Kaj kiom? »

Ĉu: « Mil diabloj, kiel vi sukcesis eniri en nian domon? »

**B.**

# Tra la fenestro - Par la fenêtr

Saluton al ĉiuj,

Kio nova, ĉi-tie, en la pariza montrofenestro kaj en la sidejo de SAT-Amikaro ?

Kiel kutime, de septembro, mi revidas kutimulojn plenajn de renovigata energio, sunbrunigitajn kun bela mieno.

La 29an de septembro, okazis kunveno por prezenti Esperanton kaj la kursojn ĉi-tie viziteblajn. La homamaso ne estis abundega tiun tagon. Tamen, de kelkaj monatoj, mi rimarkis ke, ofte envenas gejunuloj, kiuj volas scii pri Esperanto, kiuj interesiĝas pri la idealo de tiu lingvo, kiuj volas komuniki alimaniere.

La kursoj rekomenciĝis : lunde, ĵaŭde kaj sabate. Jen novaĵo : marde (dufoje monate) kelkaj kuniĝas, kune tradukas malgrandan libron el Esperanto (tiu libro, « Memoraĵoj de kampara knabo » ankoraŭ ne ekzistas en la franca). Poste, la laboro estas rete kontrolita de la instruisto.

Denove, mi vidas Esperantistojn ĉirkaŭ mi kaj tion mi ŝategas. Kelkaj SAT-Amikaranoj, eĉ el malproksime, venas por partopreni en la vivo de la sidejo.

Denove, vendrede vespere, oni babilrondas. La temoj estas diversspecaj ; kelkfoje okazas interesaj prelegetoj, ekzemple pri anarkio aŭ pri elektronika cigaredo. Se vi volas prezenti iun temon, kiun vi aparte ŝategas, ne hezitu ! Proponu, venu kaj parolu. Vi estos bonvenega.

Kiam mi estas sola, mi rigardas tra la fenestro kaj kontemplas la novan freskon, aliflanke de la strato. Tra la kvartalo multaj estas videblaj kaj unu el ili estas fama ĉar, kelkfoje, oni povas trovi ĝin ĉe la televido. Ĉu vi konas ĝin ?

Ĝis, **Dzeka**



Bonjour à tous,

Quoi de neuf ici, dans la vitrine parisienne et au siège de SAT-Amikaro ?

Comme d'habitude, depuis septembre, je revois des habitués pleins d'énergie renouvelée, bronzés avec une belle mine.

Le 29 septembre a eu lieu une réunion de présentation de l'espéranto et des cours donnés ici. La foule n'était pas là en masse ce jour-là. Pourtant je remarque, depuis quelques mois, que souvent entrent des jeunes qui veulent savoir ce qu'est l'espéranto, qui s'intéressent à l'idéal de cette langue, qui veulent communiquer autrement.

Les cours ont repris : les lundis, jeudis et samedis. Une nouveauté : le mardi (deux fois par mois) quelques-uns se réunissent et traduisent un petit livre de l'espéranto (ce livre, « Mémoires d'un gamin de la campagne », n'existe pas encore en

français). Le travail est ensuite contrôlé par internet, par l'enseignant.

A nouveau je vois des espérantistes autour de moi et j'aime ça. Quelques membres de SAT-Amikaro viennent même de loin pour participer à la vie du siège.

A nouveau, le vendredi soir, on palabre. Les sujets sont variés, parfois se tiennent d'intéressantes causeries, par exemple sur l'anarchie ou la cigarette électronique. Si vous voulez présenter un sujet qui vous tient à cœur, n'hésitez pas ! Proposez, venez et parlez. Vous serez très bienvenu.

Quand je suis seule, je regarde par la fenêtre et contemple la nouvelle fresque, de l'autre côté de la rue. Dans le quartier on peut en voir beaucoup et l'une d'elles est célèbre car on la retrouve parfois à la télévision. La connaissez-vous ?

A plus, **Dzeka**

## SAT-Amikaro

132/134, boulevard Vincent-Auriol,  
75013 Paris

Tel. : 09 53 50 99 58. Fax :  
09 58 50 99 58.

sekretario@sat-amikaro.org

### Retejo

www.sat-amikaro.org

• Sideja deĵorhoraro. *Permanence au siège* (kontroli antaŭe telefone) (*vérifier avant par téléphone*)

Lundi 17:30 - 19:00

Mardi 14:00 - 18:00

Mercredi 13:00 - 18:00

Jeudi 15:00 - 18:00

Vendredi 9:30 - 16:30 ; 18:30 - 19:30

Samedi 11:00 - 18:00 dont de 15:00 à 18:00 initiation possible pour débutant y compris en juillet

• Cours oraux au siège - pour débutants :

Les lundis 17:30 avec Georges Meilhac

**Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro.** (cherchez la rubrique « Cours d'espéranto » :

<http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>)

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

**Conseils d'apprentissage :** contactez SAT-Amikaro libroservo.

**Paiements et renseignements sur SAT-Amikaro**

• **Belgio Belgique** Claude Gladly :  
Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine;  
Reto : cglady@arcadis.be

Tel : 071/64 49 16 (en Belgio).

Bankkonto N° 750-6373051-18

IBAN B50 7506 3730 5118 BIC :  
AXABBE22

• **Svisio Suisse** Mireille Grosjean :  
Grand-Rue 9, CP 9, CH-2416 Les Brenets.

Poŝta konto n° 23-14908-9.

• **Aliaj landoj Autres pays** Pagoj paiements poŝta sendo sidejen envoi postal au siège.

reto : kasisto@sat-amikaro.org

Tel : 0033 (0) 953 927 737

Fakso : 0033 (0) 222 441 319

• **Pago per ĝiro virement :**  
SAT-Amikaro.

LBP (CCP) : 37 852 90 L 033


IBAN, FR32 2004 1010 1237 8529

0L03 314; BIC : PSST FRPPSCE

(indikante al kio kaj al kiu rilatas la pago en indiquant l'objet et le bénéficiaire du paiement)

# Pseudo-pages pour faciliter les manipulations

*Bien sûr, rien ne paraîtra au-delà de la page 16,  
mais avec le logiciel de mise en page Scribus, il  
est souvent utile d'ajouter des pages pour avoir un  
endroit où déposer les éléments que l'on manipule.  
C'est de la cuisine technique, ne vous en inquiétez  
pas. :-)*







## Francilio ricevis premion pri integrado de handikapitaj personoj

(Presservo)

Tio okazis pro la organizo de « PEPS » (parcours d'évolution professionnelle spécifique, specifa evoluanta sistemo profesia) – « ponteto » celanta profesiajn ŝanĝojn de oficistoj de teknikaj profesioj al administraciaj. Precipe el teknikaj lernejoj pro modifoj de kapabloj aŭ handikapoj, proponante al tiuj personoj la eblecon prepari sin dum 18 monatoj cele al posteno, kiel administracia adjunkto ĉe regiona sidejo, adaptita al ilia sanproblemo sed sen modifo de la postenenhavo.

Tiu organizo proponas intensivajn instrusesiojn de preskaŭ 90 tagoj kaj periodojn de profesia mergado kadre de longdaŭraj staĝoj sine de regionaj sekcioj. Tre proksima akompanado laŭlonge de la adaptiĝo, dum la diversaj fazoj, estas alportita al ili.

Sukceso de la unua « promocio » ebligis duobligi celojn por la sesio 2018-2020.

Paralele, Francilio subskribis du partnerajn konvenciojn por promocii laboron de personoj en handikapa situacio.

Unue resubskribo por tri jaroj de konvencio kun « Fundo por Integrado de Handikapitaj Personoj (FIPHFP) » cele al plidaŭrigo de efika handikappolitiko, fiksi celon ĝis 2021, superi la 6 %-ajn leĝajn devigojn por atingi kvanton de laborpostenoj por tiaj laboristoj je 6,52 %. La partnera konvencio antaŭvidas duonigon de la kosto je valoro de

2 832 685 € inter FIPHFP kaj Francilio. Tiu buĝeto ebligas, por la tri venontaj jaroj, plilarĝigi agojn rilate al sep ĉefaj celoj :

1. Strukturi, organizi, aktivigi, plilarĝigi kaj evalui la regionan handikappolitikon.

2. Instrui kaj informi la laboristojn en handikapa situacio.

3. Favorigi retan alireblecon aŭ fizikan je laborpostenoj de tiaj personoj.

4. Disvolvigi agojn favore al dungado de personoj en handikapa situacio.

5. Favorigi restadon en sia posteno de oficistoj en handikapa situacio.

6. Koncernigi, informi kaj instrui oficistaron pri la temo.

7. Krei pli en kampo de handikapo.

Francilio, ankaŭ subskribas novan konvenciojn por administrado kun asocio de « Fundaĵo por profesia dungado de handikapaj personoj (AGEFIPH) » por rilatigi aktorojn de orientado, laboro kaj instruado de tiaj personoj, sed ankaŭ la entreprenojn kaj dungantojn, por ke fine Francilianoj en tia situacio povu daŭre akiri postenon.

Tra la diversaj novaĵoj kiujn ĝi entenas, la kadra-akordo 2018-2020 ankoraŭ pli fortigas tiun kunagadon, ĉefe instalante ĝin ĉe la laborterenoj, kaj helpante pli (ekz. senpaga akompanado de projekto) per 12 horoj de konsiloj kaj kolektivaj atelieroj.

# Veganaj krespoj (patkukoj)

(por ĉirkaŭ 11 grandaj krespoj)

- 350 g da tritika faruno
- 50 g da fekulo
- 2 supkuleraj da oleo
- 45 cl da vegetaĵa lakto (migdalo, sojo, rizo...)
- 25 cl da akvo

Nenepre : 1 kafkulero da salo

- 2 kafkuleroj da sukero (kiujn vi ne aldonu se uzis sukeritan lakton, kiel ekzemple la rizan)

• laŭgusta aromo por sukerita versio (vanilo, migdalo, oranĝfloro, citrono, cinamo...) aŭ spicoj por salita versio (kumino, muscato, ajlo...)

Pretigo:

En salatujo verŝi farunon kaj fekulon kun salo kaj sukero. Miksi.

Krei puton kaj verŝi oleon. Miksi iomete.

Aldoni lakton iom post iom, samtempe miksante inter du verŝoj. Tio evitigas ke la pasto havas farunbuletojn (= grumeloj), kio okazas se vi verŝas ĉion unubloke. Se buletoj aperas, uzi

plonĝmiksilon mallonge por ilin disigi.

Fine aldoni akvon kaj kirli ĝis havi bele fluan paston.

Lasi ripozi dum ĉirkaŭ 2 horoj (malpli se vi estas urĝita !). Tiu paŭzo ebligas al la krespoj esti elaste malrigidaj kaj ne rompiĝemaj.

Kirlu denove. Normale la pasto densiĝis. Vi tiam povas aldoni iom da akvo por refluigi ĝin.

Verŝi kelkajn gutojn da oleo sur pato kaj varmigi. Kiam ĝi varmegas, verŝi unuan kuleregon da pasto kaj ŝmiri laŭ la tuta surfaco. Kuiri dum ĉirkaŭ 2-3 minutoj.

Renversi la krespon kaj kuiri dum 1 minuto la alian flankon.

Rekomenci ĝis ne plu restas pasto, kaj ĝis bela stako da frandaj patkukoj leviĝis. Frandi kun laŭplaĉa farĉo, varma aŭ malvarma.

Fonto: <https://vegan-pratique.fr/recette/crepes-simplissimes/>  
Markovo-Vito (pimskrab@yahoo.fr)



## Instrua atentigo por ne atentemaj francaj esperantistoj (kiel mi)

Ni scias, ke francaj homonimaj vortoj, plej ofte, ne havas saman esperantan tradukon. Tion mi ne atentis, kiam mi volis ornamati la referendumilon per tondilo por montri kiel distranĉi la paĝon. Ĉar estas konate, ke oni lernas per siaj eraroj, mi pensis ke mi povos fari tiun artikoleton, por profitigi iujn de mia eraro.

Tereza







Un vieux pin bristlecone, dans le désert de Moab en Utah. Le plus ancien de ces arbres, situé en Californie, était déjà multiséculaire quand ont été construites les grandes pyramides d'Égypte.

Photo : James Lott

Ces arbres qui nous semblent tous indépendants sont en fait intimement liés.

Photo : Françoise Silhol





Voici un retour  
forcé.



- 1 - 12,300
- 2 - 16,215
- 3 - 20,131
- 4 - 24,046
- 5 - 27,961
- 6 - 31,877
- 7 - 35,792
- 8 - 39,707
- 9 - 43,623
- 10 - 47,538
- 11 - 51,453
- 12 - 55,369
- 13 - 59,284
- 14 - 63,199
- 15 - 67,115
- 16 - 71,030
- 17 - 74,946
- 18 - 78,861
- 19 - 82,776
- 20 - 86,692
- 21 - 90,607
- 22 - 94,522
- 23 - 98,438
- 24 - 102,353
- 25 - 106,268
- 26 - 110,184
- 27 - 114,099
- 28 - 118,014
- 29 - 121,930
- 30 - 125,845
- 31 - 129,760
- 32 - 133,676
- 33 - 137,591
- 34 - 141,506
- 35 - 145,422
- 36 - 149,337
- 37 - 153,252
- 38 - 157,168
- 39 - 161,083
- 40 - 164,998
- 41 - 168,914
- 42 - 172,829
- 43 - 176,744
- 44 - 180,660
- 45 - 184,575
- 46 - 188,490
- 47 - 192,406
- 48 - 196,321
- 49 - 200,237
- 50 - 204,152
- 51 - 208,067
- 52 - 211,983
- 53 - 215,898
- 54 - 219,813
- 55 - 223,729
- 56 - 227,644
- 57 - 231,559
- 58 - 235,475
- 59 - 239,390
- 60 - 243,305
- 61 - 247,221
- 62 - 251,136
- 63 - 255,051
- 64 - 258,967
- 65 - 262,882
- 66 - 266,797
- 67 - 270,713
- 68 - 274,628
- 69 - 278,543
- 70 - 282,459